Dep. legal: BI-1007-88

GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO

NIA PONTO

Barrencalle Barrena, 7 - 1.°
Telefono 416 44 92
48005 - BILBAO

4ª jaro Februaro 1990 Numero 19 (1)



Ambaŭflankaj berlinanoj promenante tra la Brandenburga pordego.

(legu sur paĝ. 5,6,7)

ĈIUJARA ĜENERALA KUNVENO.

Laŭ postulas la Artikolo 7-a de nia Asocia Statuto, la estraro de la Grupo Esperantista de Bilbao kunvokas la tutan sociaron partopreni la ĉiujaran ĝeneralan kunvenon (ordinaran kaj eksterordinaran), kiu okazos, en la sidejo de la Asocio, je 1-a alvoko, la Vendredon 9-an de Marto je la 11-a horo.

Pro tio ke en tiuj dato kaj horo, supozeble, ne estos sufiĉe da partoprenantoj, la kunveno okazos, je 2-a alvoko, la Sabaton 10-an de Marto, je la 6-a horo vespere, laŭ la ĉi-suba tagordo:

1. Legado kaj aprobo, se indus, de l'Akto pri la antaŭa ĝenerala kunveno.
2. Same rilate Memuaron pri la jaro 1.989-a.
3. Same rilate financan bilancon de la jaro 1.989-a.
4. Buĝetpropono por la jaro 1.990-a.
5. Parta renovigo de la nuna estraro (Prezidanto, kasisto kaj la du vaĉdonantoj). Prezentado de kandidatoj eblas, ĝis la 21-a horo de la Jaŭdo 8-a de Marto, ĉe la Sekretario Sro. Injaki Vélez.
6. Propono (kaj aprobo, se indus), far de la nuna Prezidanto, de "Regularo pri biblioteko kaj libroservo de la Grupo Esperantista de Bilbao".
7. Informoj diversaj far de la estraro.
8. Demandoj kaj sugestoj.

ANAR-ĤANĜOJ DUM 1.989.

EKSIĜOJ:

Joana TOMAS BARRERA	12 Jan	Foriris al Barcel.
Pilar ANTIGUEDAD	27 Apr	Adreso nekonata
Begoña MARTINEZ MARTINEZ	1 Jun	Eksiĝis propravole
Leoncio GARCIA FERNANDEZ	8 Jun	Eksiĝis propravole
José A. DIEGO GUZON	25 Jun	Mortis
Santiago MARTIN RELEA	15 Sep	Eksiĝis propravole
Juan J. AJENJO ZARATE	13 Dec	Mortis

ENTUTE: 7

ALIĜOJ:

José Mª SARASUA FERNANDEZ	1 Januaro
Juan SANTAMARIA del CAMPO	9 Marto
Rafael PALAO PONS	16 Marto
Merche GARCIA ASENJO	26 Junio
Carlos BUENO CRUZ	29 Septembro
Luis Mª AMEZAGA ASENSIO	1 Decembro

ENTUTE: 6

Tiel, je la 31-a de Decembro 1.989-a, la Grupo Esperantista de Bilbao nombris 127 anojn.

COBRO DE CUOTAS (AÑO 1.990).

Al igual que el año pasado, el pago puede hacerse en cualquier sucursal de la Caja de Ahorros Vizcaína, utilizando el documento ya cumplimentado que se adjunta, y no olvidando indicar al empleado de turno que haga constar el nombre de la persona que efectúa el pago.

Quien no reciba, junto a este número de "NIA PONTO", el documento para el pago, es que no debe hacerlo en 1.990, por haberlo realizado ya previamente.

Se recuerda que el ingreso ha de hacerse en:

CAJA DE AHORROS VIZCAINA

Cuenta corriente nº: 20/218-155-0

Gracias por vuestra ayuda y apoyo!.

★★★★★★★★★★★

... Kaj memoru, **KONVERSACIA RONDO** ĉiu lundo kaj je la 20-a horo vespere okazas ĉe la Grupejo. Rekomendinda por tiuj kiuj finis elementan kurson, progresantoj, kaj ĝenerale por kiuj volas plibonigi sian lingvoscion.

Eŭska Esperanto-Asocio

La klopodoj de niaj samideanoj de Eŭska Esperanto-Asocio (ĉe Gasteizo) cele aperigon de vortaro -- Eŭska-Esperanto bone marŝas (vidu specimenon paĝ. 4).

Ĉar la entrepreno -vere meritplena kaj tre necesa por nia Movado- postulas grandan kaj daŭran laboron, iu ajn kunlaboro estas bonvena. Kontaktu nin!

Ankaŭ ili ĵus aperigis eŭskan (vaska) tradukon - de la unua parto de la Zagreba Metodo .

Ni memoru ke ĝis nun, kaj tio estas bedaŭrinda, E-lernomaterialo en la eŭska ne ekzistis (ĉar fakte la "Giltza" -vortareto E-Eŭska eldonita en 1935- pli ol lerniga estis diskoniga verketo, kaj aldone en la bizkaja dialekto.

Do, espereble, tiuj ĉi verkoj -vortaro kaj metodo- kiam pretaj ambaŭ, iamaniere solvos la mankojn kiuj ĉi-kampe la eŭskparolantoj ĝis nun sentis rilate nian lingvon.

ESPERANTO	EUSKA
klar/a	argi, garbi
-igi	azaldu
mal-a	nahasi
komenc/i	hasi
-iĝi	hasi, abiatu
kompren/i	ulertu
-eble	jakina, noski
-ema	ulerkor
kon/i	ezagutu
-o	ezaguera
-ato	ezagun
kontraŭ	aurka, (r)en truke ,aurrean
kor/o	bihotz
kred/i	sinistu
-ema	sinisbera
krom	-z gain
	ezik, salbu
kun	-kin
-e	elkarrekin
kvankam	nahiz eta, arren
la	-a, -ak
laŭ	-ren arabera
land/o	herri, herrialde
-limo	muga
ekster-a	kanpoko
labor/i	lan egin , behar egin
-o	lan
-ema	langile, behargin
-estro	nagusi, langile-zain
-isto	langile
-tago	lanegun
last/a	azken
leg/i	irakurri
lern/i	ikasi
-anto	ikasle
-ejo	ikastola
-olibro	eskuliburu
lev/i	jaso, altxatu
-iĝi	jaiki
de-i	bildu
mal-i	apaldu, beheratu
liber/a	aske, libre
-eco	askatasun
-tago	atsedenegun , jaiegun
mal-ulo	preso, gatibu
loĝ/i	-n bizi izan
-antaro	biztanlego
-ejo	etxebizitza, egoitza
long/a	luze
-eco	luzera
mal-a	labur, motz
lok/o	leku, toki

EL ORIENTA BERLINO ...

Tiu ĉi "artikolo" atingis nin el Centroeŭropo (Orienta Berlino, Germanio). Origine estis nur interpersona kores-- pondado, sed ĉar interesa kaj aktuala ni publikigas ĝin.

....Se mi resumas la lastajn monatojn en GDR, tiam estas tre mal-facile, c^ion laŭvice surskribi.
Oktobro: festo okaze de la 40a jarig^o de GDR; komenco de la "revolucio"; demonstracioj; la unuaj arestitoj; la pafordono por la armeo en kelkaj urboj (kiujn oni felic^e neniam realigis); la devizo de la demonstracioj "ne perforto"- tiel, ke la policanoj kaj armeanoj ankaŭ ne havis kaŭzon, disigi la kun-venojn per forto. Do, ili pasis trankvilaj.

Nova registraro kun la c^efo Egon Krenz. (Li vere ankoraŭ uzis la tempon, kas^igi kelkajn koruptecajn aferojn de la iamaj politikistoj niaj). Tiam- mi ne scias ekzakte nun c^u post aŭ antaŭ kiam Modrow ig^is la ministra prezidanto- la malfermo de la limoj je la 9a de novembro. Ekde tiam estas ne plu trankvila vivo en Berlin kaj GDR. Vi ne povas imagi, kiel la homoj c^e ni kaj en okcidenta Berlin festis. La ac^a afero nur estas, ke nia mono ne taŭgas por la alia parto de la urbo kaj la okcidentanoj en GDR ege bone kaj malmultekoste eluzas la avantag^ojn de la "fisoci-alisma sistemo" kiel la malaltajn prezojn por libroj, kulturumi, muzeumi, restaŭracii.....
Vi scias, ke multoj el miaj samlandanoj antaŭ la malfermo for-lasis jam la landon. Nun ankaŭ multaj laboras en la alia parto de Berlin kaj vivas en GDR kiel"la dio en Francio". Unu el la kaŭzoj estas, ke vi gajnas tie la devizojn, ilin povas s^ang^i laŭ la kurso 1 FRGa marko al 7 GDRaj markoj. Tio signifas, se oni ekz. ricevas nur la senlaborulan subtenon de monate 1000 FRGaj markoj (kiu en FRG ne estas tre multe), tiam oni c^e ni povas jam havi post la s^ang^o 7000 markojn GDRajn. C^e ni la monata enspezo c^irkaŭ estas je 1000 markoj monate. Al tio kvanto ankaŭ rilatas niaj prezoj.
Do, kristnasko ankaŭ falis la bariloj burokratiaj por la FRG-anoj. Ili ne plu devas pagi la devigitan monon de 25 markoj tage. Denove festado en Berlin. Kuna festo c^e la Brandenburga pordego dum silvestro, kiu finis per granda akcidento- granda laboro por la malsanulejoj en ambaŭ partoj de Berlin, malafabla saluto al la nova jaro.

Ekde oktobro aperis multaj novaj organizoj kaj partioj.
Unu el la formoj de la demokratio nun estas la "ronda tablo", kie reprezentantoj de la ligoj diversaj konsiladas kaj proponas al la registraro la rezultojn. Se la parlamento (Volkskammer) volas decidi novajn leg^ojn, tiam ili ricevas subtenon de la "ronda tablo".
Ekde novembro ankaŭ laboras diversaj laborrondoj, esplorkomisioj, kiuj okupig^as pri la korupteco, pri la okazoj dum la 7/8a de oktobro, pri la situacio ekologa, pri potencmisuzado.....
Kaj ili trovas, trovas..... Se oni legas pri la aferoj de niaj iamaj politikistoj kaj funkciuloj, tiam oni miras, kiel ili suk-cesis, manipuli nin tiel, ke ni ne vidis, ne kontraŭis, ec^ jubilis parte al ili. Kredis fidele kaj plenfide.
Ili estis for de la kritiko.

Pri la c^apeleta antaŭen-iro kulpas nur net-aŭga komputila programo.

Ah^ jes, mi ankoraŭ ne menciis la iaman "sekuran armeon Staats-sicherheit".
Dank al Krenz kaj lia prokrasta politiko al la "Stasi"(popol-bus^e) ankoraŭ sukcesis, malaperigi multajn aktojn kaj doku-mentojn, kvankam la civitanaj-komisioj tuj postulis fermi la ejojn centrajn de Stasi kaj okupis post kelka tempo la oficejojn. La tiama registraro subtenis la komisioj nur"duonkore" kaj per tio malhelpis malkas^igi la fiaferojn de la ministerio.

Ankoraŭ io pri la momenta ekonomia situacio.
Niaj kombinatoj (ligoj de entreprenoj, kiuj sufic^e ofte produktas similaj aferojn) ne efektive laboras (-is).
Unu el le kaŭzoj estas la planekonomio tielnomita. En tiu planada sistemo ne la plej grava estas, kion oni kontraŭ kiom da profito vendis, sed unue oni devis plenumi la postulitajn ciferojn.
Ne la kvanto, kion oni vendis, sed kion valoron oni produktis, estis la plej grava por la statistiko. Minimume tiu c^i pens-maniero dum la lastaj jaroj regis- simple dirite.
Ne plenumi la kvanton de la produktado signifis, ke oni havis multajn problemojn por ekz. ricevi kreditojn, subtenojn.
Unu el la plej multaj laboroj do ig^is la statistiko.
Memkompreneble tio sonas tre stulta (grandparte ankaŭ estis), ne la prezoj regulis c^e ni la merkaton, sed la bezono nura.
La GDR pro tio preskaŭ c^iujn necesajn aferojn mem produktis, anstataŭ ac^eti sur la mondmerkato. La prezoj estis fiksita de la s^tato. Por produktoj, kiujn oni vendis al la popolo oni de la s^tato ricevis subvencion parte, se la produktado pli multe kostis.
Ni vendis tial multajn niajn produktojn sur la monda merkato, por ricevi devizojn, kvankam la aj^ojn ankaŭ c^e ni mankis, ec^ se ni ricevis relative malaltan gajnon.
Pardonu, se mi ne tre klare kaj facile povas klarigi tion, sed ne klarigeblas, oni devas travivi.
Dua problemo estas, ke tiu, kiu havas la plej altan edukadon ne gajnas la plej altan salajron. Tio memkmpreneble ne instigas la teknikistojn kaj ing^enierojn al pli bona klopodo, pli faciligi kaj plimalmultekostigi la produktadon. Jen fakte la rilato inter scipovo kaj pago ne harmoniis.

Pro diversaj novaj leg^oj nun jena situacio aperis: La okcidentaj entreprenoj havas intereson, doni kreditojn, subvenciojn kaj kontraŭ tio de niaj produktejoj ricevi la kundecidrajtojn.
Unue estas c^e ni ankoraŭ libera merkato en Eŭropo kaj due oni tiamaniere povas fari profiton.
Kelkaj el niaj neefikaj entreprenoj jam fermis- kaj subite en GDR ni havas senlaborulojn. Nu jes, senlaboruloj en kapitalismaj landoj estas normale, sed ni ankoraŭ neniam estis konfrontitaj kun ili. Sekve ni ne havas leg^ojn, kiuj protektas la rajtojn de la senlaboruloj. Tial momente ili nur ricevas ege malaltan financan subtenon de la s^tato.
La sindikatoj- g^is nun ili jesis kiam la entreprenaj gvidantoj ion proponis- ne kapablas labori, c^ar ili ne plu havas la konfidon de la laboristoj. Ili momente nenion povas decidi.
Devas fakte tre rapide aperi novaj leg^oj kaj rajtoj por la sindikatoj..... la strikrajto; kion fari, se fermas entreprenoj; la salajran sistemon prilabori.....

En preskaŭ c^iuj partoj de nia industrio la homoj nun timas,

perdi la laboron (ec^ mi!)*, c^ar oni ne vidas estontecon bonan.
Se ni havos la sistemon de la kapitalismo, c^u ni eltenos la premon al kvalita laboro? Niaj homoj ne maldiligente laboras, sed malefektive. Kio estas kun tiuj, kiuj jam pliag^as?
Evidente, nun c^efe inoj perdas la laboron. Kion fari kun tiuj, kiuj laboris en institucioj, kiujn ni nun ne plu bezonas?

Jam komencig^is la unuaj strikoj- kontraŭ la salajra sistemo, kontraŭ la prokrasta politiko, kontraŭ la nuna ekonomia agado, por la reunuig^o de Germanio, por la sociala merkato, por pli multe da libera tempo, por pli multe da feriaj tagoj.....
Se daŭrig^os la strikoj, tiam ni baldaŭ havos situacion kiel en Pollando. C^u la homoj neniam lernas?

Zorgigas min ankaŭ, ke nun sur la stratoj ne plu la samaj demonstracias, kiel dum oktobro/novembro.
Aperas c^iam pli da fas^istoj kaj dekstruloj sur la stratoj.
La devizo "sen perforto" ne plu ekzistas. Estas ofte bataloj inter dekstruloj kaj maldekstruloj. Aŭdeblas per fortaj voc^oj la krio al reunuig^o. Ve, se vi aperas dum la demonstracioj kun la flago de GDR. Tiam vi certe sekvonttage havos buntan nazon.

Antaŭhieraŭ fondig^is organizo de novfas^istoj en Leipzig.
Bona signo por germanoj. Bonega por Leipzig, kie komencis la trankvila revolucio.....

Marte estos balotadoj por la parlamento. La nuna parlamento regule ne rajtus labori, c^ar dum la lastaj balotadoj oni nin trompis. Tion ni c^iuj supozis, c^ar ja ni multe interparolis pri la baloto- sed oni ne povis laŭtdiri tion, c^ar tiam vin atendis la malliberejo ofte aŭ vi "rajtis" forlasi la landon.
La FRG donas al kelkaj novaj partioj financan subtenon por la balotbatalo. La malnovaj partioj perdis la konfidon kaj pro tio multajn membrojn.
Sed min "miras", ke oni parolas de sociala merkata sistemo kaj samtempe volas, ke iu pro tiu ne havu malavantag^ojn!?
Kiel do tio funkciu? Iu certe c^iam ne havos la samajn s^ancojn.
Jes, ni esperplene rigardas la estontecon.
La kapitilistoj certe al ni helpos, kaj kiu estas pensiulo, malsanulo, havas multajn infanojn mem kulpas kaj devas vidi, kiel travivi en lando, kie regas la volpa sistemo.
Aŭ ni iĝos la kolonio de FRG, kie oni havas la modernajn sklavojn, aŭ ni ig^os la parto, kiu estas traktita kiel la suditala parto en Italio de Italio....
Kion alportos la estonteco vere nur ni scios post la balotado.

Kaj en Esperantujo?
Ankoraŭ ni estas en la Kulturligo. Sed oni ne plu tiom da mono donas nun.
Ni gejunuloj provas fondi propran, sendependan, memstaran junularan ligon. Ni jam posedas "seg^on" c^e la ronda tablo de la junularo. Ankaŭ estonte ni kunlaboros kun la Esperanto Asocio, tamen ni provas, trovi aliajn mondonvolontulojn.....
Nia kunlaboro kun la okcident-berlinaj Esperantistoj ankaŭ progresas. Ni nun kune eldonas la "berlina informilo"(n).

(*) laŭ profesio ŝi estas inĝenierino.

SABINE TRENNER (Berlin - GDR)

Berlin, 1990/02/01

LINGVOJ DE SOVETUNIO

Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj estas la plej granda lando en la mondo. Ĝi okupas en Eŭropo kaj Azio 22,4 milionoj da km. -sesonon de la loĝata tersurfaco- kaj etendiĝas de okcidento ĝis oriento sur ĉirkaŭ 10.000 km. (11 horzonoj) kaj de nordo ĝis sudo sur ĉ. 5.000 km. Havas 284,5 milionoj da loĝantoj, pli ol - 130 etnoj, ktp... kaj ĉ. 130 lingvoj.

Apartenas tiuj ĉi ——— idiomoj al diversaj lingvo-familioj, el kiuj la plej granda estas la hindeŭropa, kaj en tiu superregas la grupo slava: la lingvoj rusa (uzata kiel gepatra de 153 milionoj kaj kiel dua post la gepatra de 61 milionoj), ukraina - (35 milionoj), belorusa (7 milionoj); la lingvoj litova (2,5 milionoj) kaj latva (1,5 milionoj) konsistigas la baltan grupon, - la moldava (2,5 milionoj) apartenas al la grupo latinida, la taĝika (3 milionoj) al la irana grupo, dum la armena (4 milionoj) per si mem formas individuan grupon de la sama lingvofamilio.

Post la hindeŭropa familio sekvas laŭ la nombro da parolantoj la tjurka familio kun la lingvoj uzbeka (12 milionoj), kazaña (6 milionoj), azerbajĝana (5 milionoj), turkmena (2 milionoj) kaj kirgiza (2 milionoj).

La lingvo kartvela (aŭ "gruzina" - 3,5 milionoj) estas la plej multnombra laŭ la nombro da parolantoj, inter la lingvoj kaŭkazaj, kaj la estona (1 miliono) estas en Sovetunio la ĉefa reprezentanto de la finn-ugra lingvofamilio.

La 15 nomitaj lingvoj estas la oficialaj aŭ ŝtataj lingvoj de la koncernaj uniaj respublikoj, dum - la rusa servas ankaŭ kiel la lingvo de interpopola (do, tutsovetia) komunikado. Tamen en Sovetunio ekzistas ankaŭ lingvoj de popoloj, sufiĉe multnombraj, kiuj estas administre reprezentataj ne kiel uniaj respublikoj, sed -- kiel aŭtonomaj respublikoj, aŭtonomaj regionoj kaj aŭtonomaj distriktoj.

Perestrojko ankaŭ ebligis reorientiĝon de la lingva politiko -antaŭaj registaroj emis supertaksi la rolon de la rusa lingvo malfavore al la lingvoj de aliaj nacioj-, kaj nun en multaj sovetuniaj respublikoj akceptiĝas leĝoj cele al pli efektiva defendo de la naciaj lingvoj kaj plifirmiĝo de la pozicio de lingvoj de pli malalta politika statuso.

Lingvoj: ĉ. 130. Oficialaj aŭ ŝtataj lingvoj en la koncernaj respublikoj:
(nombro da parolantoj, milionoj)

Rusa	153
Ukraina	35
Uzbeka	12
Belorusa	7
Kazaña	6
Azerbajĝana	5
Armena	4
Kartvela	3,5
Taĝika	3
Litova	2,5
Moldava	2,5
Turkmena	2
Kirgiza	2
Latva	1,5
Estona	1

Alfabetoj uzataj: 5 (cirila, latina, armena, kartvela, hebrea).

UNIO DE SOVETAJ SOCIALISMAJ RESPUBLIKOJ (SOVETUNIO)



Loĝantaro: 284 500 milionoj.

Disdivido:	(milionoj)
urba	188,9
viroj	134
kampara	95,6
virinoj	150,5

Etnoj: ĉ. 130.

Kvin plej multnombraj etnoj:

	(milionoj)
Rusoj	137, 39
Ukrainoj	42, 34
Uzbekoj	12, 45
Belorusoj	9, 46
Kazaĥoj	6, 55

Kvin plej loĝataj urboj:

	(milionoj)
Moskvo	8,9
Leningrado	5
Kievo	2,6
Taŝkento	2,2
Baku	1,8

"Kaj post la kurso, kion?"

Kion mi faros kiam mi scios Esperanton? Ĉu mi povos uzi Esperanton? Kian profiton mi havos el Esperanto?

Tiujn kaj similajn demandojn ankaŭ vi aŭdis, eble de viaj kursanoj, eble de personoj al kiuj vi konsilis lerni la lingvon. Ĉu ni povas doni kontentigan respondon? Mi supozas ke ne ĉiam ni povas kontentigi la demandintojn, ĉar ni mem ofte ne scias kiel uzi Esperanton en la vivo. Ni traktas ĝin kiel hobion kiu plenigas parton de la libera tempo. Estas tamen homoj kiuj volas eniri la aferon pli profunden; do kion ni montru, kiujn eblecojn de Esperanto? Mi invitas vin al diskuto pri tio, kaj jen miaj respondoj:

1. Sendube vi povas *korespondi*. Miloj da homoj volas skribi leterojn al aliuloj per neŭtrala lingvo. Vi trovos korespondemulojn en kelkaj dekoj da landoj, se vi volos. La adresoj estas en pluraj Esperantaj gazetoj, ankaŭ vi povas aperigi anoncon tie, cetere ne nur pri la korespondemo. Ekzistas apartaj servoj por faciligi trovon de korespondemulo.

2. Partoprenu en esperantistaj aranĝoj naciaj kaj internaciaj. Miloj da ili okazas ĉiujare. La plej konataj estas la kongresoj de UEA kaj TEJO, konferencoj de fakaj organizaĵoj, kulturaj aranĝoj de esperantistaj centroj, internaciaj feriadoj kaj tendaroj.

3. *Aŭskultu* radiajn dissendojn en Esperanto por ekscii diversajn aferojn el pluraj landoj. El la 14 regule funkciantaj dissendoj vi povas aŭskulti kelkajn, tio dependas de via radioricevilo.

4. *Abonu* Esperantajn gazetojn: vi povas regule ricevadi kelkajn dekojn da ili. Pluraj el ili estas abonataj en pli ol 70 landoj. Ili estas riĉa fonto de informoj.

5. *Verku* por Esperantaj gazetoj. Multaj redaktistoj volonte akceptos viajn kontribuojn.

6. *Legu librojn* en Esperanto. Vi havos unikan ŝancon legi originalajn verkojn kiuj ekzistas nur en la Esperanta literaturo. Vi povos ankaŭ ĝui bonajn tradukojn (el naciaj literaturoj) de famaj verkoj. Ĉiu trovas ion por si.

7. *Verku aŭ traduku libron* kaj tiel vi kontribuos al pliriĉigo de la Esperanta (aŭ via nacia) literaturo.

8. *Evoluigu vian interesiĝon*. Funkcias pli ol 50 fakaj organizaĵoj internaciaj kiuj uzas Esperanton oficiale; vi povas aliĝi al iuj. Tiel vi kontaktos homojn, kiujn interesas la sama afero, do vi povos aktivi internaciskale.

9. Uzu Esperanton en via *profesia laboro*. Vi povas kontakti esperantistojn, kiuj havas saman profesion kiel vi, kaj evoluigi vian kunlaboron internaciskale. Tiel vi kontribuos al profesiigo de Esperanto.

10. *Studu aŭ instruu* en Akademio Internacia de la Sciencoj en Sanmarino. Unu el la oficialaj lingvoj de la akademio estas Esperanto.


11. *Turismo* per Esperanto. Kiam vi vojaĝas per neesperantistaj entreprenoj, vi vizitas lokojn kaj objektojn. Kiam vi vojaĝas per esperantista entrepreno, vi vizitas ĉion ĉi kaj ankaŭ amikiĝas kun homoj, vizitante anojn de la loka movado. Krome, pluraj Esperantaj entreprenoj ofertas relative nemultekostan turismadon. Eble vi volos uzi ankaŭ Pasportan Servon de TEJO; unue membriĝu en ĝi. Biciklu kun esperantistoj: Biciklista Esperantista Movado Internacia aranĝos tion por vi.

12. Fondu *internacian entreprenon* (komercan, turisman aŭ alian). Pluraj esperantistoj interesiĝas pri tio.

13. Vi povas ankaŭ *instrui* Esperanton. Ĉie sur Tero mankas kompetentaj instruistoj de la lingvo.

Kompreneble post ĉiu propono mi klarigas detale kiel ĉion aranĝi, se montriĝas intereso. Tiuj supraj ekzemploj konsistigas ne ĉiujn eblecojn de esperantoscio, krome ili estas ĝeneralaj. Ĉu vi povas doni pli da ekzemploj? Ĉu vi alimaniere respondus la demandon?

Joachim Werdin
(Pollando)



KUTIMAJ DIRAĴOJ

Caer en desgracia	=	Trafi en malfavoron.
Estar sobre ascuas	=	Sidi sur pingloj.
Estar molido, hecho polvo	=	Esti disbatita.
A ojo de buen cubero	=	Okul-mezure.
No me des la lata	=	Ne litaniu al mi.
Quien calla, otorga	=	Silento estas konsento.
Eso es buena señal	=	Tio estas bon-aŭgura.
Pasarse de la raya	=	Transiri la limon.
Con el rabillo del ojo	=	Okul-angule.



SOVETI-INTERNACIA ESPERANTO-FESTIVALO

Volgogrado

Volĵskij (Sovetunio), 2-9 majo 1990

La 3a Soveti-Internacia Esperanto-Festivalo "EOLA 90" okazos en Volĵskij de la 2a ĝis la 9a de majo 1990. Laŭ la organizantoj temos pri la plej granda evento por la sovetia Esperanto-movado de post la jaro 1926. Historia momento do, kaj historiaj momentoj estas nepre vivindaj...

La internacian duonon reprezentos i.a.: Internacia Klasika Esperanto-Ĥoro; Bulgara Esperanto-Teatro; Teatro Esperanta de Parizo *TESPA*; teatra grupo *Kia koincido!*; rokgrupoj *Amplifiki*, *Persone*, *Team'* ; pola kabaredo *Amuzo*; ktp.

La sovetian duonon reprezentos multnombraj sovetiaj artistoj.

Ambaŭ duonoj ĝuos la ĉeeston de (laŭtakse) pli ol 400 bruemaj kaj festemaj esperantistoj, plus tiun de la sovetia kaj volgograda televizioj kaj de la gazetaro.

Kadre de la Festivalo, ĉiuj partoprenantoj konatiĝos kun Moskvo, Volgogrado kaj Volĵskij. La kotizo, kiu inkluzivas ĉion (manĝojn, hotelojn, ŝipvojaĝojn, programon en Moskvo kaj Volgogrado), estas 180 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro. Por studentoj nur 100 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro.

Partoprenontoj sendu al la Organiza Komitato por invitilo jenajn informojn: plenan nomon, naskiĝdaton, naskiĝlokon, adreson, profesion.

Organiza Komitato: Esperanto (EOLA), ab. ja. 73, u. Volĵskij 30, Volgogradskaja obl., SU-404130, Sovetunio.

Pliajn informojn petu ĉe la Grupejo